



Esperanto-Informilo



Foto: G. Hennemann, la 23-an de novembro. Bildo de Kornberg(grenmonto) proksime al Dillenburg en vintra robo.

Mesaĝo de la prezidanto:

Ĉi-nokte iomete frostis en Hesio kaj la nombroj de gripaj infektoj jam kreskiĝas ...do atentu pri via sanstato kaj kondukti laŭeble singarda. Havu belan adventan sezonon kaj ĝuu la kristnaskan etoson en viaj familioj.

G. Hennemann, 2-an de decembro 2025

Decembro
2025

Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Esperantaĵo
- Lasta paĝo

Kolofono:
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.

c/o Georg Hennemann
Rehgartenstrasse 16
35683 Dillenburg
Tel.: 02771 8196614

Bankverbindung / bankkonto:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: BE92 9051 1007 7223
BIC: TRWIBEB1XXX
bei: Wise, Belgien

Jahresbeitrag / jarkotizo:

ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnlnadnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

„Renkontiĝo ĉe Wiesenhüttenplatz apud ĉefstacidomo“

Vortrag Prelego
 “Prelego pri miaj vojaĝoj al Madagaskaro”
 U. Matthias

[https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape Frankfurt 2021 Panorama.jpg](https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg)

Anoncoj:

- 14.12.25 Okaze de la Zamenhof-Tago ni renkontiĝos je la 12-a horo sur la Wiesenhüttenplatz en Frankfurto por kanti la esperon kaj reciti el la Fundamento. Kaj poste renkontiĝos en apuda japana restoracio Moŝ-Moŝ, vidu ankaŭ la alvokon de Ulriko je la lasta paĝo
- 16.12.25 Dum nia lasta renkontiĝo en Saalbau MÜZ ni havas la okazon ĝui prelegon de Ulrich Matthias pri siaj vojaĝoj al Madagasio.



elstara foto: Ĉielo, sendita de U. Fellmann la 1-an de decembro, 9:43 CEST. “Mia foto de la tago.”

Ĉu la doktrino pri la Triunuo aŭ Trinitaro estas biblia ?

Eseo okaze de la koncilo de Niceo antaŭ 1700-jaroj

De Georg Hennemann

En ĉi tiu semajno Papo Leono la 14-a alvokis al unueco inter kristanoj de malsamaj konfesioj dum sia vizito al Turkio. "Ni ĉiuj estas vokitaj superi la skandalon de la dividoj, kiuj bedaŭrinde ankoraŭ ekzistas, kaj nutri la deziron al unueco," diris la Papo vendrede ĉe ekumena preĝkunveno en Iznik. Li alvokis al "serĉado de frateco". La ceremonio, kiun ankaŭ ĉeestis ortodoksaj kaj protestantaj eminentuloj, memorfestis la Koncilion de Niceo antaŭ 1700 jaroj. La preĝkunvenon gvidis la ortodoksa Patriarko de Konstantinopolo, Bartolomeo la 1-a. Ankaŭ li alvokis al daŭrigo sur la "vojo de kristana unueco" malgraŭ la "dividoj" de pasintaj jarcentoj. Sed ĉu ĉiuj kristanoj ankoraŭ scias pro kiu temis en tiu koncilio? Tre verŝajne ne, ĉar estiĝis disputo ĉu la persono Jesuo estas Dio samkvalite kiel sia patro, do laste temis pri la triunuo aŭ trinitaro de la kristana Dio.

Hodiaŭ ne restas dubo ke la doktrino pri la Triunuo ne estas biblia kaj pro tiu ĝi povas esti nomata erara kristana dogmo. En tiu loko mi povus jam fini mian eseon kaj diri vin al la subaj fontoj, kiuj pruvas la herezon de la Triunua dogmo. Nur pro la sekvantaj problemoj, kvereloj, ja eĉ senĉesaj bataloj kaj eĉ murdoj inter la diversaj kristanaj grupoj, indas ke oni okupu sin pri tiu erara doktrino, kiun parto de kristanaj komunumoj ĝis hodiaŭ ne akceptis. Ĉi-lastata pozicio povas esti atribuita al la Arjanoj kaj, en modernaj tempoj, al la Unitaranoj. Ambaŭ vidpunktoj estas herezoj el Trinitara perspektivo. Islamo ankaŭ povas esti priskribita kiel kontraŭ-Trinitara doktrino; la Korano eksplicite malakceptas la ideon de la Trinitaro. Kelkaj Mesianaj Judoj ankaŭ malakceptas la Trinitaron. Male, estas ĉefe la doktrino de la Trinitaro, kiu malebligas al Judoj rekoni Jesuon kiel la Mesion.

Sed kial tio doktrino estas tiel grava por la rom-katolika kristanismo: En la jaro 325 p.K., ĉirkaŭ 300 episkopoj de la Romia Imperio kunvenis en Niceo, la nuna Iznik, por la ekumena koncilio kaj establis la fundamentojn de kristana doktrino, inkluzive de la dogma kredo ja Triunuo, kiu ankoraŭ validas hodiaŭ. La centra tiama disputo estis la kristologia demando pri la naturo de Jesuo kaj lia pozicio rilate al Dio la Patro kaj la Sankta Spirito: Temo, kiu en la frua kristanismo tute ne estis disputita, sed nur ekde la 3-a jarcento ekflagris kaj poste eĉ minacis la regnon de la romana imperio sub

imperiestro Konstantin 1-a. La koncilio finiĝis per la (provizora) venko de la kontraŭuloj de Arjanismo aŭ diversaj formoj de Origenista hipostaza teologio kaj per la Nicea Kredo, kiu asertis la diecon de Jesuo kaj la esencan unuecon de Dio la Patro, Jesuo la Filo kaj la Sankta Spirito (Trineco). La konfeso estis almenaŭ formale agnoskita de la vasta plimulto de episkopoj de la Konsilio, sed kelkaj el la orientaj episkopoj malakceptis la konfeson dum la konsulta fazo. Malgraŭ la decido de la Koncilio, la resolucioj en la Arjana konflikto restis polemikaj inter la kunvenintaj ekleziaj eminentuloj, kaj kelkaj el la episkopoj, kiuj subskribis ilin, ĉiuj apartenantaj al la tiel nomata Origenista meza grupo, poste reprenis aŭ distancigis sin de ili. Ekzemple, Eŭsebio de Nikomedio skribis en letero al la imperiestro: "Ni agis peke, ho Princo, kiam ni konsentis pri blasfemo pro timo al vi."

La interesa fakto estas ke la t.n. kelta kristanismo, kiu evoluis ekde la 2-a jarcento grandparte memstare en Irlando, Skotlando kaj Kimrio, unue ne kredis pri la Triunuo kaj la derivataj doktrinoj de prakulpo kaj elsaviĝo pro krucumo de Jesuo.

Ian Bradley (naskita en 1950, Preleganto pri Eklezia Historio kaj Praktika Teologio ĉe la Universitato de Aberdeen) verkis la libron "La Kelta Vojo" en 1993. Germana traduko ("Der keltische Weg") estis publikigita de Josef Knecht en Frankfurto en 1996; ĝi nun estas elĉerpita sed ankoraŭ aĉetebblas de antikvaĵistaj librovendistoj. Bradley atentigas, ke ekzistis du apartaj vidpunktoj en la kristana tradicio koncerne la naturon de la savanta verko de Jesuo Kristo. (Ĉi tio rilatas al la klasika teologia disciplino de soteriologio.) Unu vidpunkto komenciĝas per la biblia rakonto pri la "Falo" kaj la doktrino de la prapeko, vidante la verkon de Kristo kiel nian elaĉeton de peko kaj ĝiaj teruraj konsekvencoj. La alia havas pli pozitivan vidpunkton pri la mondo kaj la homa kondiĉo, vidante ĝin malpli kiel ekstreme ŝarĝita de peko kaj pli kiel nematura kaj nekompleta." (Bradley, p. 83) Ŝajnas al mi, ke ĉi tiu lasta vidpunkto estas plej bone esprimita simple per la vortoj, kiuj ofte reaperas en antikvaj orientaj ortodoksaj preparoloj, en kiuj Dio estas dankata pro sendado de sia Filo "por renovigi vian bildon en ni."

Ligiloj: <https://weltmanager.de/trinitaet.html>
<https://www.youtube.com/watch?v=5Ha3L7uu998> kaj komentoj
https://de.wikipedia.org/wiki/Erstes_Konzil_von_Nic%C3%A4a
<https://de.wikipedia.org/wiki/Antitrinitarier>
<https://en.wikipedia.org/wiki/Nontrinitarianism>
<https://erhardgriese.wordpress.com/2011/03/14/schopfung-und-erlosung-im-keltischen-christentum/>

Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

Gasto plendas ĉe la pordisto de la hotelo: -

"Hodiaŭ matene estis una bruna kaj una nigra ŝuo antaŭ mia pordo." -

"Strange. Vi estas jam la dua gasto, kiu diras tion."

Proverbo de la monato (elektita de G. Hennemann)

Hodiaŭ mi prezentas proverbon kiu temas pri saĝeco en kampo, kie oni ne nepre atendas ĝin

„Ofte ĉapo de kampulo kovras kapon de saĝulo“

https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_001796.htm

Anstataŭ enigmo: Legu la daŭrigon de la rakonto "Advento en Altmontaro" kaj respondi jenan demandon:
„Kiel nomiĝas la hundo de Benedikto kaj kio estas ĝia karesnomo?“



Alvoko por kunlaboro por la jubilea libro "ESF 125-jara"

De Felmano Ulriko

En la jaro 2029, nia Esperanto-Societo iĝos 125 jarojn aĝa. Tiu jubileo miaopinie simbolas gravan turnopunkton. Ĝi povas esti granda ŝanco retrorigardi al nia historio kaj antaŭenrigardi al nia ebla estonteco. Multaj iamaj esperantistoj investis tempon, ideojn, laboron, kaj, metafore dirite, korosangon, en la aferon kiun Zamenhof komencis, la kreinto de nia internacia lingvo. Ĉu ni ne kaptu la ŝancon, kiun tiu jubilea jaro ofertas, por resumi niajn farojn, analizi nian staton, kaj investi en bonan kaj pacan estonton de niaj posteuloj?

Sed kiel kontribui? Kiel plifortigi nian nuntempe ankoraŭ bonetosan kaj viglan, tamen ŝrumpantan, societon, kiel pli levi nian spiriton, kreskigi la membraron, pliaktivigi la Esperantistaron? Mia plano estas, kolekti viajn ideojn por fari tion. Diru, skribu, alvenu, kontribuu!

Ekzemplajn ideojn mi kelkajn jam iam donis kaj plu donos ĉi tie, sed, mi ĉefe celas nun al instigi vin, karan leganton, pensi pri tiuj demandoj:

Ĉu ni en 2029 faru grandan feston?

Kian?

Kiel ni celebru?

Ĉu ni reklamu por varbi novajn membrojn?

Kiel? Ĉu surstrate, ĉu en la interreto?

Aŭ ĉu ni faru grandan finan feston, kun bankedo, invitu multajn Esperantistojn, fordonu nian bibliotekon, fortrinku nian ŝparitan monon, kaj fermu la klubon?

Mi proponas almenaŭ produkti belan jarlibron, kun rakontoj pri nia klubo, pri iamaj membroj, pri historiaĵoj, kun multaj fotoj, anekdotoj, kak multon alian. Ĉiu de vi kontribuu! Ĉu tiu jarlibro estos nia lasta, fina verko, aŭ ĉu ĝi estu mejloŝtono por plua estonta vivo de nia Esperanto-societo, tion mi volas diskuti kun vi ĉiuj, kun la membroj, kun la nemembroj. Donu vian opinion! Skribu leteron! Papere aŭ retpoŝte, al Georgo aŭ mi, aŭ tajpu en nian Telegraman kanalon! Publikigu en nia esperanto-informilo!

Kion vi opinias ke ni faru?

Kion vi volas fari mem, se ion ajn?

Kion vi pensas pri miaj proponoj kaj demandoj?

Ni ĉiuj respondecas, kiel la afero evoluos.

Zamenhofaĵo, rilate la naskiĝdatreveno de nia majstro

De Felmano Ulriko

Eble ne tiom konatas, ke Zamenhofo ofte uzis la interjekciojn "ho" kaj "ve", kaj tre ofte kombinite. Jam en siaj leteroj li uzis ilin, kaj ankaŭ jam en siaj fruaj tradukoj. Ekzemple, li okfoje uzis "ho ve" en sia traduko de Hamlet, kiun li finis en 1893, dekdu jarojn antaŭ la unua internacia Esperantokongreso. Sed ankaŭ en postaj jaroj li ofte aplikis tiun esprimon, kaj ankaŭ tre ofte la ho kaj la ve sole.

Mi trovis en Hamleto tiujn 8 okazojn de la elkrio "ho ve!" :

.....

"Ve! ho ve!

Al mi, mi, kiu vidis lin antaŭe
Kaj vidas lin en lia nuna stato!

.....

Ho ve! Kion vi faris!

.....

Ho ve! Li freneziĝis!

.....

Ho ve, sur kiu kuŝas respondeco
Por tiu sanga faro?

Jes, sur mi:

Mi el singardo devis lin enŝlosi.

.....

Gertrudo, kiam venas la suferoj,
Ho ve, ne izolitaj ili venas,
Sed en amaso.

.....

Ho ve, li jam mortis,
Lin oni forportis,
Ni lin jam revidos neniam!

.....

Jes, ho ve, droniĝis!

.....

Mi esperis, ke vi estos
Edzino kara de Hamleto mia;
Esperis mi ornamo vian kronon
De fianĉino, dum, ho ve, mi nun
Ornamas vian tombon!

Provtraduko de la novelo “Advento en la altmontaro”

Daŭrigo de la novelo “Advento en la altmontaro” de Gunnar Gunnarsson

Kiu ĝis nun okazis: Same kiel en antaŭaj jaroj Benedikto preparis sian adventmigradon tre zorgeme kaj nun ekiris kun lia hundo Leo kaj lia virŝafo Knorc al la altmontaro, postlasante la ĉevalon Fakse, kiu “bedaŭrinde estis tro etpieda kaj peza por tratroti la profundan, malfirman neĝon de la antaŭvintro, kaj cetere ne tro kapabla, tiom multe da lacegaj tagoj elteni kun nur malmulta manĝaĝo, kion la tri aliaj provizore povus.”

Poste ili venis al bieno, kaj la ĉiutaga vivo salutis ilin per sia kamparana amikeco; Sed kafo, ne dankon, ne hodiaŭ, ili iom hastas, la tagoj estas mallongaj, do koran dankon. La kamparano longe kaj zorge studis la ĉielon kaj, sincere, ne bone pensis pri la vetero. — Jes, vi nur devas preni la veteron kiel Dio donas ĝin, — diris Benedikto. La kamparano siaflanke nur esprimis la esperon, ke ĝi komenciĝos ankoraŭ antaŭ la nokto. Benedikto klare malŝatis tiajn paroladojn, kaj do ili devas plui.

“Ĉu viaj kunuloj estas bonaj?” demandas la kamparano, ne volante lasi la viron foriri. Li vidas lin eble la lastan fojon, kiu scias — li ankaŭ havis tian malfacilan sonĝon, kaj ĝi estis palpebla: ĉirkaŭ ĉi tiuj tri estisodoro de baldaŭaj provoj, se ne pli malbonaj. — Ĉu Knorc ne estas nur ŝarĝo por vi? Ĉu vi povas fidi je li — kaj je la hundo?” - “Ĉu mi povas?” respondis Benedikto, “ni ĉiuj tri kutimas al ĉiaj aferoj.”

Oni ne diru tian en la horo de danĝero, oni ne defiu la potencojn tiel arogante — la kamparano staris silente kaj lasis lin foriri. Do ili iris, ili trio, kaj dubema viro, malkontenta pri si mem, pri ili kaj pri la mondo, restis malantaŭe, observis ilin kaj maĉis tabakon. Neniu alia komprenus tiajn homojn - riskante ĉion, eĉ iliajn vivojn. Kaj por kio? Por kelkaj strangaj ŝafoj. Ĉar Benedikto havas tre malmultajn, kaj al li ne mankas unu.

Supozeble ankaŭ Benedikto ne komprenis la singardan farmiston. Ĉiuokaze, ili tri pluiris. Hodiaŭ estis bona tago, kaj neniŭ devas difekti ĝin, la bonan festotagon. Hodiaŭ antaŭ multaj jaroj, Jesuo eniris Jerusalemon. Se vi scius ĝin, vi ankaŭ povus senti ĝin klare; La tago ricevis sian karakteron de tio kaj konservis ĝin tra la jarcentoj. Benedikto vidis lin tiel klare antaŭ si, kiam li eniris la gloran, sunlumitan urbon. Li vidis iliajn blankajn murojn kaj domojn en la bilda Biblio kaj Jesuon sur la azeno en la mezo de ili. La branĉoj, kiujn la homoj tranĉis de la arboj kaj dismetis ĉe la piedoj de la azeno,

aspektis kiel frostaj floroj sur fenestrovitro. Sed li bone sciis, ke ili ne estas blankaj; Ili estis verdaj, abunde verdaj, kaj iom da sunbrilo alkroĉiĝis al iliaj glataj folioj. Kaj subite la vortoj de la malnova libro eksonis preskaŭ aŭdeble tra la aero, kvazaŭ la ondoj de la etero ilin konservis kaj oni devis nur klini al ili la oreilon: Jen via reĝo venas al vi, humila kaj rajdanta sur azeno kaj sur ĉevalido, ĉevalido de azeno.

Milda! Benedikto komprenis tion. Kiel la Filo de Dio povus esti malsama? Kaj rajdante sur la azenidon — ĉar el ĉio, vivanta kaj mortinta, nenio estas tro malgranda por servado, nenio, kio ne estas sanktigita per servado. Eĉ la Filo de Dio. Kaj nur per servo. Kaj Benedikto subite pensas, ke li konas la azeneton kaj scias precize, kiel li kaj la Filo de Dio sentis sin en tiu sankta horo. Kaj li klare vidas homojn etendi siajn plej bonajn vestaĵojn sur la vojo, kaj aŭdas aliajn demandi: “Kiu estas ĉi tiu viro?” Vere! “Kiu estas ĉi tiu viro?” Ĉar ili ne konis la Filon de Dio. Kaj ili devus koni lin. Sur lia profunda, simpla vizaĝo brilis rideto, nur iomete ombrita de la malĝojo, ke ili ne sciis pli bone. Ke iliaj okuloj estis tiel nebuligitaj, la spegulo de iliaj koroj tiel nebuliĝis. Kaj ĉe la vido de tiu malĝoja rideto, Benedikt sentis doloron tra la koro. Kiel blinda oni devis esti. Stari vizaĝon kontraŭ vizaĝo kun la Savanto kaj ne rekoni lin! Li estis firme konvinkita, ke li mem rekonis lin unuavide. Kaj li tuj aliĝus al li kaj helpus lin forpeli la malrespektulojn el la sanktejo kaj renversi la tablojn de la monŝanĝistoj kaj la seĝojn de la kolombvendistoj.

Ĉe tiu ĉi penso, Benedikto suprenpuŝas sian ledan ĉapon kaj sekigas sian frunton. La promenado ne streĉis lin, sed ĉi tiuj militemaj pensoj ŝvitigis lin. Li estas paca homo; li neniam revis fari perforton kontraŭ siaj kunhomoj, almenaŭ ne ekde kiam li fariĝis plenkreskulo. Sed la vortoj de la Savanto: “Mia domo estos nomata domo de preĝo, sed vi faros ĝin kavo de rabistoj” - ĉi tiuj vortoj elvokis en li brulan ĝenon.

Ĉi tiu ideo - la komercisto planas movi sian fraŭdan butikon en ilian malnovan gazonpreĝejon! Tiam paco estus finita. Kaj kun ĉi tiuj vortoj de la Savanto en siaj oreloj, li sentis sin preta fari ĉion, kion oni petis de li — sub la gvido de la Sinjoro. Ŝanĝilistoj - ve! Kolombovendisto - haha! Kaj komercistoj ĝenerale - li konis la tipon. Nur provu ne pensi pri ĝi. Kaj denove li viŝis sian frunton. Pri la butikistoj, kiujn li konis, la komercisto kaj la kolportistoj, — certe estis ĉiaj aferoj,

kiuj povus esti diritaj kontraŭ ili, sed li ne havis intereson devi bati ilin per la pugnoj.

Tio estis la penso de Benedikto, liaj ĝojoj kaj malĝojoj, dum la griza tago ĉirkaŭ li iom post iom nigriĝis, la plenluno ekflamiĝis malantaŭ la nuboj, kaj fojfoje montriĝis paseme en pala vespera ĉielo.

Benedikto ne multe zorgis pri si dum sia vojaĝo. Kial li devus? Al la okulo, nun tiu tago forvelkis, li iom post iom fariĝis nur neklara ombro en la pejzaĝo. Kaj tamen restas la demando, ĉu lia ideo pri li mem ne estis eĉ pli malklara kaj difuza. Li estis nur servisto, servuteca servisto; estis lia tuta vivo. Aŭ pli precize, duone farmisto, duone kabanulo. Ĝenerale, estis io duonkora, sensignifa ĉe li, tra kaj tra. Duone bona - duone malbona, duone homa - duone besto. Jes, tiel estis kaj nenio alia. Dum la somero li laboris por salajro en la bieno, kie li vivis la tutan jaron. Vintre li prizorgis tie la ŝafojn kontraŭ manĝaĵo kaj iom da vestaĵo. Li estis sia propra majstro nur por mallonga tempo printempe kaj aŭtune kaj poste dum sia montovojaĝado antaŭ Kristnasko.

Krome, li posedis sian propran stalon kaj garbejon por sia ĉevalo, siaj ŝafoj kaj la fojnon kiun li falĉis sur luigitaj herbejoj dimanĉe post preĝejo. Do li faras bone kaj estas ja nur simpla homo kaj servisto, kaj li ne atendas aŭ strebas fariĝi io alia - eĉ ne en la ĉielo. Almenaŭ ne plu. Tiuj tagoj finiĝis. La tagojn kaj noktojn kiam li revis sonĝojn kaj sentis sopirojn al feliĉo kaj libereco ĉi tie kaj tie. Finis - kaj estis bona afero. Nur tiam li sentis sin nelibera. Ekde tiam, li fariĝis iom pli homa - jes, entute homa. Krom se tio ankaŭ estis vanteco kaj riproĉinda aroganteco.

Nu, ĉiaokaze, li jam estis pli maljuna viro, kvindek kvar, do ne estis multaj aŭ longaj malĝustaj vojoj por ke li perdiĝu plu. Kvindek kvar jarojn - kaj jen la dudek-sepa fojo, ke li promenas ĉi tien. Li ĝuste scias ĝin, li memoras la nombron de jaro al jaro: la dudek-sepan fojon. En la aĝo de dudek sep jaroj li komencis ĉi tiujn piedvojaĝojn; dudek sep fojojn li piediris tra la lando al la montoj, kutime la unuan dimanĉon de Advento, kiel hodiaŭ. Ho jes, tempo pasas. Dudek sep jaroj - tiel profunde kuŝis liaj revoj entombigitaj. Tiujn sonĝojn, kiujn nur Dio kaj li mem konis. Kaj la montojn, en kiujn li kriis ilin en sia agonio. Sed eĉ dum sia unua vojaĝo, li lasis ilin tie. Tie ili estis sekure konservitaj. Aŭ ne tiel certa? Ĉu ili hantis la solecon de la montoj kiel maltrankvilaj spiritoj, kiuj vivas siajn pasemajn, perversajn vivojn en dezerto de neĝo kaj veteraĝa roko? Ĉu ili estis efektive tiuj, por ke li devis iri tien supren ĉiu vintro - ĉu ili ne ankoraŭ fariĝis laca kaj enprofundigis

en la teron? Sed li forskuis tiun person: ne, li ne estis en tia mizera situacio.

Kaj nun ili alvenis al sia tranokta loĝejo kaj iris supren laŭ la deklivo, kiu kondukis al la korto, Benedikt, Knorc kaj Leo. La farmkonstruaĵoj estis situantaj sur malgranda kresto ĉirkaŭ kiu la deklivoj de la altebenaĵoj kiel duoncirklo fermiĝis. Ili situis alten - kio estis avantaĝo, precipe printempe kiam la suno plifortiĝis - kaj tamen protektitaj. Benedikt profunde enspiris kiam li atingis sian celon por la tago, poste turnis sin kaj rigardis malantaŭen la vojon, kiun li venis. Lia mano kaptis la kornon de Knorc - kiel varme ĝi estas ĉe ĝia radiko -, ĉe lia alia flanko staris Leo kaj svingis la voston. Tie ili staris. Estis certa konsekro pri ili. Ne tiom, ke Benedikto sentis la ĉielon super si malfermita, sed tamen estis kredo malfermita, kvazaŭ; Li ne estis sola sur la tero kaj ne sentis sin tute forlasita. Ne tute. Ili staris tie, kaj Benedikto rigardis super la landon kaj absorbis tion, kion li vidis. Freŝa krepusko malleviĝis super la montaro, nun kiam la tago malleviĝis kaj la malhela lumo de la luno brilis pli hele de ĉielo, kie glaciaj montoj dravis, montoj kiuj ŝajnis realaj kiel la blankiĝantaj krestoj ĉe la horizonto kun siaj obtuzaj linioj de ombro. La tero aperas pli plata en tia vespero kiam la lago estas frostigita kaj la glacisurfaco estas kovrita per neĝo. Kaj meze de tiu ĉi glacia mondo, kiu direktiĝis al dissolvo en mallumon, staris - mem parto de la malluma vespero - la viro Benedikt, duone farmisto, duone kabanulo, staris ĉi tie kun siaj plej proksimaj amikoj, la virŝafo Knorc kaj lia hundo Leo - kaj ĉi tiu mondo estas lia mondo. Ĉi tie li vivas kiel parto de ĉio, kion li povas atingi kaj kapti per siaj okuloj kaj manoj, per siaj pensoj kaj intuicio. Tiu ĉi mondo estas lia; Li estas parto de ĉi tiu vivo. Ne, ke li pensis tian aferon, konscie pensis tiel. Li eĉ ne konsciis, ke li haltis kaj transrigardis, ĉar li kutimis foriri el Botn frue antaŭ la tagiĝo kaj jam estis alte sur la montoj kiam tagiĝis. Li nur sentis ion kiel malplenon en sia brusto, sopiron, kiun oni ne povis fiksi nek klarigi, strangan, tiran hejmsopiron. Ĉu, ĉar li devis forlasi la loĝatan landon dum kelkaj tagoj, aŭ ĉar la adiaŭo ĉiam memorigis lin, ke ĝi iam povus esti eterne, li ne sciis. Homo alkroĉiĝas al sia propra, al si kaj al sia propreco, eĉ preter la morto, kaj timas perdi sian tenon sur la vivo - ĉi tiu plej reala el ĉiuj realaĵoj, ĉi tiu plej mizera el ĉiuj mizeraj aferoj, ĉi tiu plej senfina el ĉiuj senfinaj aferoj; timas la solecon sur kiu baziĝas lia memo, kiu estas lia memo, timas esti sen kunhomoj ĉirkaŭ li - kaj eble forgesita de Dio.

... daŭrigota

Lasta paĝo

Invito por vizito de Wiesenhüttenplatz je la 14-a de decembro

De Felmano Ulriko

Je la 15-a de decembro preskaŭ la tutmonda Esperantujo celebros la Zamenhoftagon. Samkiel lastjare, ni invitos ĉiun kunveni je la placo Wiesenhüttenplatz en Frankfurto ĉe Majno, kie la Esperanto-Societo Frankfurto estis fondata en la jaro 1904, la sama jaro, en kiu Zamenhof finverkis la Fundamenton de Esperanto. Antaŭ la historia fondodomo, ni povas kanti, deklami poemojn de Zamĉjo aŭ aliaj Esperantistoj, kajaŭ rakonti historiaĵojn. Poste ni kune piediros al apuda restoracio. La tempon kaj precizan lokon vi povas legi en tiu ĉi informilo.



Esperanto-novaĵoj

AdE

Konferenco de la Akademio de Esperanto
La 15an de decembro, okaze de la Zamenhof-festo, okazos la kvina Konferenco de la Akademio de Esperanto, spektebla en la reto per zoom. Legu pli ĉe <https://sezonoj.ru/2025/11/akademio-33/> kaj spektu la konferencon.

 237 27 nov, 13:17